H. DE K.


# „PACO KAJ JUSTECO"

MEDEDEELINGEN VOOR DE LEDEN

3-a jaro - nº IO "MEDEDEELINGEN" Septembro 1944


## LA PSIKOLOGIO DE LA MURDO (3-a daŭrigo)

Par. 3.- Tria etapo : la krizo.-
La forigo estas decidita, necesas preni sur sin la konsekvencojn de la akcepto.

"Mi do forigos lin". Tiam necesas persone akcepti la degradiĝon al la ago, ĝian riskon kaj ĝian honton. La uzo de ekvivalentoj, la fatalismo (la submetiĝo al la okazaĵoj) aperas kaj akuta morala kaj fizika stato ŝiras la subjekton. Lia sentemo estas ekstreme ekscitata, lia emociteblo elekvilibra, lia juĝkapablo obsedata de la krizo kaj lukta stato kaj momente delira. La eksplodo minacas: ĝi povas ankoraŭ esti malhelpata sed detalo provokos ĝin.

La krimulo sentas ke li agos; la plej eta stultaĵo de la viktimo la ironio de amikoj maksimume influas lin. En sia morala agonio li tamen volas akordi kun si kaj iel pravivi sian konduton: li ekzemple ŝveliĝos la familiajn incidentojn, en kvieta tempo eĉ ne rimarkatajn, tiel ke eĉ nura penso, tute flanka, sed nesingarde esprimata, povas ekigi la agadon.

Ĉi-loke oni komprenas la grandan, kvankam nerektan efikon de la temperamento, de la nervopatio (6), de ĉiuspeca malekvilibro, de la eĉ tre mildaj formoj de interpreto kaj persekuto (7). Se specife patologia ago forestas, la tuta aktiveco tamen apogas sur reagoj kaj teniĝoj kies patologia eco kaj ĝia eventuala grado ne estas precize takseblaj. Tial la ago estas komprenenda ne en si mem, sed en la personeco de la kulpulo, studata en diversaj - ne deliktaj - manifestoj de lia ekzisto.

Baldaŭ ni ekzamenos almenaŭ unu kazon de murdo, sed ni ripetas ke, same kiel la konvertiĝo, la genezo de la murdo povas halti en unu el la tri periodoj. La krima ideo, en la honesta homo (en vi kaj mi, kara leganto !) svenos dum la konsento senefika: tuj li taksas kaj repuŝas ĝin. Pro la malhelpoj, la prokrasto, la hezitoj, malapero de ĝiaj motivoj la krimo povas aborti en la dua stadio. Fine, ĝi povas halti dum la krizo tial ke la malnova memo reakiris sian ekvilibron. Eĉ pli, post la decido, la ago povas fiaski aŭ esti maltaŭge plenumata pro inhibicioj de la malnova memo (io grava por la antaŭmedito, vidu poste VI).

En tiu studo, du elementoj okupu nian atenton: la reziston de la memo en la faro aŭ eĉ en la akcepto de la krimo kaj la reagojn de la personeco. Ju pli individuo stabiliĝis en moralaj praktikoj, kiuj malaprobas tian agon, des pli li bezonos tempon por adaptiĝi al la degradiĝo: tiu tempo estos tre longa por reala morala personeco, neglektinda por individuo sen tia personeco. Homo, meze honesta (kaj la plej honesta krimulo certe situas sub la mezlinio !) nur regrese iras al ago tiel senhonoriga kiel krimo. Oni devas retrovi, vidi kaj pristudi tiujn regresajn paŝojn. Homo malmorala, ne socia, iros tre rapide, tuj akceptante la faron, negravan por li. Sed ambaŭ ne agos same: kaj, por pliriĉigi nian koncepton pri tiuj agoj, ni esploros en par. 4.- la krimonaskajn cirkonstancojn.

-------

(5) nº 2332 el la Esperanta teknika medicina vortaro de Dro Briquet eld. Internacia Revuo, Bruselo, 1933.

(7) Tiuj vortoj apartenas al la teĥnika vortaro de la psikiatrio. En la deliro (waan, waanzin of delirium), perturbiĝo de la juĝkapablo, eblas ke la subjekto deliras pri vere okazintaj faktoj, kies interpreto kontraŭas al la realon kaj jen la delira interpreto (waaninterpretatie of verklaringswaan). Tiu malsano iam havas la formon de persekuto: la subjekto opinias sin malutilita de la ĉirkaŭaĵo, li ĝenerale ne restas pasiva, protestas, ĉar li estas viktimo, kaj uzas tiucele diversajn kaj

multajn esprimmanierojn (vervolgingsgedachten).
(Vidu Dr. F. D'Hollander, Handboek der Psychiatrie, N.V. Brepols, Turnhout, 1942, blz. 57 en vgld.)

(daŭrigota - verkis K.M.)

---

POR SCIVOLEMULOJ. GANGSTER-BANDITISMO EN USONO KAJ ĜIA BATALO KONTRAŬ LA G-MEN-POLICANARO. (1-a daŭrigo)

Tre influhava kaŭzo ankaŭ estis la tiutempa Usona fisituacio kaj precipe la malbona edukado de la gejunuloj. Usono iĝis la granda lando de la industrio. Ĉie urbegoj - oni nomis ilin fungurbegoj - ekestis. En kelkaj dekjaroj miloj da fabrikoj estis konstruitaj. Sed la situacio en en tiuj industriurboj estis tre malbona; unuflanke la grandaj milionuloj kiuj posedis grandegajn fabrikojn, kiel Swift, Libby, Armour, tri grandaj sinjoroj el Chicago kiuj, por tiel diri, havis en sia mano la tutan industrion de la urbego, speciale "The packing industry" (enmeto de legomoj, fruktoj, viando k.a.) kaj "The stockyards" (la porkmortigejoj). Tiuj milionuloj loĝis en grandegaj "skyskrapers" (nuboskrapuloj), kie regis brilega lukso. Ili ankaŭ posedis grandegajn terenojn kaj oni nomis ilin la "magnatoj". Ne nur en Chicago sed ankaŭ en aliaj Usonaj industriurbegoj kiel New-York, Pittsburg, San Francisco, New-Orleans k.a., tiu situacio ekzistis. Aliflanke la milionoj da mizeruloj, kiujn la grandaj ege ekspluatis. Ili vivis en tre malbonaj cirkonstancoj. Kvankam ili multege devis labori, ili preskaŭ nenion gajnis. Tio do ne miregu vin ke ili, ofte strikis, ĉar ili estis malkontentaj kaj ĵaluzaj je la grandaj kiuj posedis ĉion. Do tre tendita situacio.

La infanojn oni neglektis, kaj tio estis komprenebla: ekz. la gepatroj devis labori en la fabriko, la infanoj restis solaj - kaj se oni scias ke la tiamaj laboristoj vivis en stratetoj en industrikvartaloj, ofte kun multaj familioj en unu domaĉo - oni komprenis ke tia loko ne taŭgis por la infanedukado - tiuj infanoj serĉis kamaradojn, formis bandojn, sin amuzis laŭ sia maniero, ili povis vivi laŭ siaj instinktoj ĉar neniu estis por ilin kontroli.

Infano ja ne estas plenkreskulo kaj ne scias ĉu tio kion ĝi faras, estas bona aŭ malbona. Estas la tasko de la edukado tion montri al ĝi. Se oni ne donas edukon al infano, tiu-ĉi mem serĉas ĝin sed plejmulte sur malbona vojo. Multaj el tiuj infanoj iĝis banditoj, fihomoj - ne ili solaj estis kaŭzo, sed ofte la fimoralo de la industria mondo, kie oni nur konas nur unu aferon: la mono.

Karaj gelegantoj, mi nur donis en grandaj linioj kelkajn gravajn kaŭzojn de la gangster-misfaroj en Usono; ekzistis ankoraŭ multaj aliaj, kiujn mi ne volas pritrakti ĉar ja mia artikolo nur estu resumo.

Antaŭ ol fini tiun-ĉi unuan ĉapitron mi volas ion scigi el la prikrimula teorio de la konata itala antropologo Lombroso. Tiu klerulo - oni certe jam renkontis lian nomon en la tre interesa revuartikolo "Psikologio de la murdo" de mia kara samideano K.M. - asertas ke la "gangsters" estas homoj tiel korpe kaj mense sanaj kiel ni mem estas. Estas eĉ escepto kiam oni trovas inter ili banditoj, kiuj estis konsciaj de iliaj faroj. En kio konsistas nun la diferenco inter morala homo kaj krimulo? Ĉiu homo havas en si bonajn kaj malbonajn emojn. Morala homo sufokas tiujn malbonajn emojn kiel malamon, venĝemon, deziron, maldiligentecon, malhumilecon. Krimulo kontraŭe lasas liberan vojon al tiuj fiemoj, ĉar aŭ li ne havas sufiĉe da energio aŭ li vivas en malmorala medio, kiu malebligas la evoluon de la bonaj emoj. Tiel li ne havas moralan sencon, kompation kaj, direktita per siaj fiemoj al krimo, li agas senpense, plejmulte senpente. Vi do vidas, ke ĉiu homo - estas nur tre malmultaj esceptoj - havas en siaj manoj sian destinon. Ĝi komplete dependas al li mem ĉu li iĝos morala aŭ malmorala estulo. Antisocia homo ne naskiĝas en unu tago, li evoluas al krimulo aŭ per la medio, en kiu li vivas, aŭ per interrilato kun aliaj fihomoj - la aserto, ke "la malliberejo estas la plej granda lernejo de la krimo" estas tute vera.

Rimarku, karaj gelegantoj, ke tio, kion mi diris pri la plej gravaj kaŭzoj de la gangster-banditismo ekzisto nur rilatas al la finiĝo de la XIX-a kaj la komenciĝo de la XX-a jarcento. Post 1930 la fisituacio plimalgrandiĝis kaj en la nuna tempo, speciale per la laboro de John Edgar Hoover, policestro de la G-Man-policanaro, ĝi preskaŭ tute malaperis.

---

## 2.- La sistemoj de la "gangsters" kaj iliaj labormetodoj.

La grandan okeston de la gangster-bandoj dum la trinkaĵkontrabandista periodo, mi jam en la antaŭa ĉapitro sufiĉe priparolis. Ni rigardu do al tio, kio okazis post tiu periodo.

Kiam la trinkaĵfabrikado publikiĝis, la "gangsters" bezonis novan laborterenon. La novaj sistemoj ekestis. Inter ili la "Racketing", kiu estis por la banditoj nova kokino kun oraj ovoj. Kiel la ŝtato impostas siajn subulojn, la "gangsters" komencis imposti la komercistojn. La unuaj viktimoj estis la legomvendistoj. Kiam frumatene tiuj-ĉi iris al la vendoplaco, la "gangsters" ilin haltigis, kontrolis iliajn varojn kaj demandis al ili certan imposton laŭ la varenhavo.

Se la viktimoj pagis tion, la "gangsters" promesis ŝirmi ilin kontraŭ aliaj bandoj, kiuj ankaŭ povus fari la samon. Se ili rifuzis, la banditoj detruis iliajn varojn kaj plejofte eĉ mortigis la viktimojn. Tiu sistemo montriĝis tre fruktodona, kaj plivastiĝis ankaŭ en aliaj sekcioj, ĝis fine ĉiuj vendejoj, butikoj, magazenoj, kiuj ion estis profitaj, devis pagi monate siajn impostojn.

Kaj la polico ? Tiu-ĉi faris kion ĝi povis por kontraŭbatali la "racketing". Sed ankoraŭ tro multe da ĝiaj anoj estis koruptitaj aŭ ne posedis efikajn batalrimedojn. La leĝo de la plej forta ankoraŭ tiutempe regis. Modernegaj mitrajlpafiloj, bomboj kaj aliaj armiloj estris. Nur post aranĝo de la speciala policgrupo de G-Men, la "racketing" rapide perdis sian valoron, ĝis fine ĝi estis kompleta ekstermita.

Italujo estis la lando, kie la bandoj multnombre ekzistis. Kiam la Italianoj enmigris Usonon, ili alportis tiun socian peston. Ankaŭ la "racketing" [estis "nenio] novi sub sole". Tiu "racketing"-sistemon oni jam pli frue vidis [en] la stratoj de la "Santa Lucia"-kvartalo en la Italiana urbo Napoli sub [la n]omo de "Camorra". La Kamoristoj estis banditoj, kiuj demandis al preterpasantaj koĉeroj certan monsumon.

(daŭrigota)

(verkis por la revuo: Martens Roger)

888888888888888888

## LA GRUPA VIVADO.-

Periodo de la 20-a de julio ĝis la 3I-a de aŭgusto I944.

La ĵaŭdaj laborkunvenoj allogis sufiĉe grandan nombron da gemembroj. Klarigo de eraraj frazoj, sinlaboremo de la sekretario Roger Iserentant kaj kruciverteniguo de la vicprezidanto Alfons Norro estis interesaj kaj agrable okupis la gemembrojn. Sed la apogeoj de tiu-ĉi periodo estis tre interesaj paroladoj: unue de la vicprezidanto Alfons Norro pri "La prapatroj" (3.8.44) en kiu li eksplikis kaj montris kiel sukcese fari genealogian tabelon - li mem faris la sian - ; due de la ludgvidanto Roger Martens pri "Greka Mitologio" (I7.8.44), en kiu li priparolis la ĉefajn grekajn diojn kaj mitojn priheroajn; trie de la prezidanto Fernand Roose pri "Greka Filozofio" (en du fojoj 24.8.44 kaj 3I.8.44), en kiu li detale kaj klare parolis pri la ĉefaj grekaj filozofoj, iliaj sistemoj kaj skoloj. Tiuj paroladoj allogis multajn gemembrojn kaj mi estas certa ke tio estas granda instigilo al la paroladistoj daŭrigi siajn paroladojn.

La prezidanto ankaŭ disdonis la premiojn de la konkurso. Tiuj ekzamenoj estis granda sukceso. Ludgvidanto Roger Martens okupis la unuan lokon kun I83 poentoj. Sekvas Callewaert Carlos I05 p., André Claeys 68 p., Callewaert Jacqueline 66 p., Marie-Thérèse Roose 6I p., Marie-Louise Serave 60 p., Emile Stalpaert 60 p. , k.t.p.

Samgrupano Martens Roger ankaŭ aranĝis kurson de simpla Bridge. La estas tre kontenta ke li ne estis "Vox clamantis en deserto" (ni ja antaŭ jaro vidis ke simila speca kurso malsukcesis, kaŭze de ne intereso ĉe la gemembroj, kiam la sekretario Iserentant R. volis instrui la interesegan ŝakludadon al la gemembroj); feliĉe kelkaj gemembroj sin interesis al tiu kurso kaj la prizorganto esperas ke ili baldaŭ sin amuzu per tiu ludo. Tiuj kiuj volas havi pliajn detalojn pri tio kartludo nur tion demandu al li; li bonvole respondos al ili.

Pri la raportoj oni povas esti tre kontenta. Ili estis redaktitaj en bona stilo kaj oni pere de ili povas ankaŭ konstati la progreson de la gemembroj sur esperantlingva tereno. La gefratoj Jacqueline kaj Carlos Callewaert meritas plumeton.

Estrarano André Claeys faris 2 mallongegajn raportojn sed je demando de la rubrikprizorganto li faliĉ refaris ilin. Sed "les extrêmes se touchent" kaj la refaritaj raportegoj estis longegaj.

La diliĝentaj kunvenoj regule okazis: oni pingpongis, biljardis kaj kartludis.

La vetero iĝis tre bela kaj la diversportaj ekskursoj al la tereno de Ryckevelde estis grandaj sukcesoj. La ekskursantoj bone sin amuzis, dum multaj fotografaĵoj eternigis belegajn momentojn.

Dum la 2 festtagoj la ĉeestantoj per ludoj diversspecaj agrable pasigis sian tempon.

(Prizorgis: Martens Roger)

&&&&&&&&&&&&&

## SKIZO DE LA ANTIKVA GREKA FILOZOFIO.

Laŭ la patro Dominikano Struyven diras en sia tre leginda verko "Mondeklezio kaj Mondpaco" la ĉefa distingo inter intelektuloj kaj ne intelektuloj estas ke tiuj lastaj nur konas faktojn dum ke por la unuaj, ĉiuj faktoj ankaŭ la plej kutimaj iĝas tuj problemoj.

Tio estas la kerno de la filozofio. Efektive kelkaj de tiuj faktoj estas tiel ordinaraj ke la plej granda parto de la homoj neniam pensas pri ili sed tamen tiel multesignifaj ke oni devas tre ofte pensi pri ili. Tion faras la filozofoj. La ĉiutaga vido de tiu grandega universo, la mirindega organizado de la kreitaĵoj precipe de la homa korpo, la racio kaj la moralo voĉo en la homo, ĉio tio nenion diras al la neintelektuloj sed al la pensemulo ili tuj inspiras demandojn pri la deveno, la celo, la konsisto, la esenco, la signifo. Ĉu antaŭ la Grekoj oni filozofiis ? Sendube. Ni estas certaj ke ekzemple la Ĥaldeoj kiuj estis precipe paŝtistoj en la ebena kaj fruktodona Mezopotamio, dum iliaj noktaj vekadoj ofte pensis pri la mistero de la vivo dum ili pristudis la astrojn kaj tiel iĝis astronomoj kaj matematikistoj. Sed bedaŭrinde ion pozitivan ni ne scias pri tio. Ĉu ili nenion skribis pri siaj internaj duboj kaj serĉadoj ? Ĉu la tempo ĉion detruis ? La unuaj verkoj pri tiuj temoj estas grekaj. La unuaj pensmoj en sistemoj ordigitaj troviĝis en Grekujo. De la filozofio kiel scienco ekestis tie.

La unua problemo.-

Vi devas bone konscii, karaj gelegantoj, ke sankiel vi ne kapablas krei ion tute novan konsistantan el tute nova antaŭe neekzistanta materio (efektive vi nur kapablas krei kunmetante aŭ aliformante jam antaŭe ekzistantajn materiojn) tiel vi ankaŭ ne kapablas ion ajn neniigi. Eble vi kredas detrui la materion de papero kiam vi bruligas ĝin ? Tute ne. Vi aliformigas ĝin. El tiu nun venas fumo, cindro kaj varmo. Tiuj tri miksiĝas kun la tero kaj akcelas novan kreskadon.

Nu, en la sepa jarcento antaŭ Kristo trafis la atenton de kelkaj Grekoj pensantoj ke tiu evoluo aŭ ŝanĝiĝo ĉiam revenas. Ekzemplo: la homoj nutras sin per kreskaĵoj. Tio kio el la nutraĵo formiĝis en la korpo denove venas al la tero. La homo mem estas enterigata. Tie la substancoj reidentiĝas al la tero kaj el tiu tero venas denove kreskaĵoj utiligitaj al nutrado. Alia ekzemplo: la akvo iĝas sub la influo de la varmo vaporo. Tiu vaporo miksiĝas kun la aero. Sed sub la influo de la malvarmo denove iĝas akvo kaj falas kiel pluvo. Tiu evoluo estas la cikla (tio estas: en rondo), ĝi do ne havas nek komenciĝon nek finiĝon. Ĝi do estas eterna. Ni do vidas samtempe ion ĉiam ŝanĝiĝantan kaj ion ĉiam restanten. Ĉiuj aferoj kiujn ni vidas do devas esti la diversmaniera montriĝo de la esenca materio. Kio estas tiu esenca materio ? [illegible] de la solvo.-

A.- la monistoj (ĉiuj kiuj asertas ke la universo estas unu tuto el unu esenca materio).

I. La naturo en si mem konsiderata

a) kiel eterna ŝanĝiĝo

Tales de Mileto

Anaksimandro

Anaksimenes

b) kiel restanta ordo

Pitagoras

3. La naturo kiel ĝi montriĝas al la homa kono (noto: tio ne estas la sa[illegible] ma kiel sub I. Ĉar ekzemple bastono ŝajne en la akvo ŝajnas por ni ro[mpita]

pita, kaj tamen ĝi ne estas rompita.)

a) kiel eterna ŝanĝiĝado por la homaj sentoj

Herakleitos de Efeso


b) kiel restanta "esto" por la homa racio
Parmenides de Elia
a Pluralistoj (tiuj kiuj asertis ke universo konsistas el pluraj diver-
saj esencoj materioj).
Empedokles de Aggrigento
Anaksagoras
Demokritos
Tute apartan lokon okupas Plato.

(daŭrigota)

(verkis por la revuo: Drs. Fernand Roose)

ANGULO DE LA SERĈEMULOJ.-

S T R A N G A  E N I G M O .




Sur ĉiu linio oni plenigu du vortojn laŭ ĉi-subaj difinoj. En la meza fa-
keto oni havas la lastan literon de la unua vorto. Tiu lasta litero estas
samtempe la komencliter de la dua vorto. Je ekzakta pleniĝo vi povas legi
en la faketoj 24 kaj 25 vertikaldirekte du proverbojn.
Antaŭ ol doni la difinoj de la enigmo, ni devas mencii ke nur ŝajne du
membroj legis la alvokon, en la rubriko "angulo de la serĉemuloj" de la an-
taŭa numero, pri la 5 enigmoj por kies solvo ni promesis specialajn premiojn.
Efektive nur Martens Roger kaj Callewaert Carlos (kune kun la fratino Jacque-
line eble) ensendis. Martens la 5 solvoj. Callewaert nur la "pluvombrelo kaj

la "papilio". Martens faris ne eĉ unu eraron; Callewaert havis 3 etajn erarojn. Ni speciale gratulas la du samideanojn kaj al ili donos la premiojn dum la unua laborkunveno.

& & &

Jen la difinoj:

1. sufikso montranta inklinon aŭ kutimon al io - sovaĝa besto (R)
2. speco de grenobrando (R) - distancmezuro egala je 352 m. (R)
3. urbo (R) - sufikso signifanta doktrinon aŭ sistemon.
4. senkolora - ringoforma koralinsulo (R)
5. forta epidemia malsano (R) - tuto de la konsciaj kaj nekonsciaj spiritaj fortoj (R)
6. [illegible] (R) - Hinda laboristo (R)
7. malgranda ilo kun pintaj ekstremoj uzata de teksistoj - militisto (R)
8. servisto de restoracio (R) - fari mallongan, kritikan raporton pri verko (R)
9. larĝa seĝo por pluraj sidantoj - beloga floro (R)
10. kurba nefermita linio kiu konstante malproksimiĝas de la centra punkto (R) - saltinsekto (R)
11. persono kiu faras ekzaktan similantan bildon de iu aŭ io - havante la formo de ovo.
12. batalanto en la cirkoj de antikva Romo (R) - granda religia movado en la 16-a jarcento (R)
13. ostoj en la piedo - tia estas la movado de la maro
14. filo de nepo (R) - insekto havante kvar subtilajn flugilojn (R)
15. herbo el kies fadenoj oni faras teksaĵojn - balanciĝi
16. senpene farebla - preskaŭ ne
17. la planko de la ŝipo (R) - malfermaĵo de vulkano (R)
18. stelo (R) - lozanĝo (R)
19. libertempo (R) - osto de la skeleto (R)
20. multnombra senorda kolekto (R) - tuto de la vertebroj (R)
21. multfoje (R) - planedo (R)
22. parto de la masto (R) - prefikso
23. malmola kalkeca substanco (R) - vesto de la antikvaj Romanoj (R)

ATENTU : la solvo oni sendu antaŭ fino de monato Septembro al la prizorganto de la "angulo de la serĉemuloj" ISERENTANT Roger, Steenweg op Blankenberge, 86, Brugge

[illegible]ENTOJ DE VIAJ GEMEMBROJ.-

N A C H T .-

Als 't milde gelaat van een moeder
is nacht nu gekomen tot mij;
met handen als van een behoeder
en kleeren van streelende zij.

De wind waait zijn troostende woorden
uit wuivende kruinen tot mij;
en kalmte uit vredige oorden
is stillende stemme voor mij.

De sterren mij strooien in 't harte
wat vrede en wat rust en wat pijn.
En immer verbreeden de nachten...
Zoo moederlijk troostend ze zijn...

(Kio Tedat)

---

KIEL ONI ĜIN ESPRIMAS EN ESPERANTO ? -

- Ne juĝu pri afero laŭ ĝia ekstero - (Men moet niet naar den schijn oordeelen.)
- Ofte ĉapo de kampulo kovras kapon de saĝulo - (Schijn bedriegt)
- Min instruas eraro, kiun faras najbaro - (Een schip op strand, een baken in zee.)
- Ne ekzistas forto kontraŭ la morto - (De dood spaart niemand)
- Ŝparu kiam bone, vi havos kiam bezone - (Sparen doet garen)
- Al papero ne mankas toleremo - (Het papier is geduldig)
- Nur tiu ne eraras, kiu nenion faras - (Die niet doet, niet mist)
- Ne timu bojantan hundon - nek mordas ĝi, nek faras vundon - (Blaffende honden bijten niet).

XXXXXXXXXXXXXXXX